

# REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ

## Administra Konsilantaro

### Al laboro per korespondado

Registrolibro de la Mondcivitanoj estas asocio kies agantoj kaj responsantoj troviĝas dise tra la planedo. Tio taŭgas kun la normala naturo de organizaĵo nia, sed tiu diseco estas kiel bremsilo à la demokrata decidigo, kaj do al la progreso de la monda civitaneco. Nia Administra Konsilantaro ne kapablas ofte kuniĝi, kaj kiam okazas kunveno tio estigas longajn kaj altkostajn vojaĝojn, kiuj povas malpersvadi iujn kaj do ilin malkuraĝigi.

Fronte al tio en sia kunveno de la 29a de aprilo 2008, la Estraro de Mondcivitana Registrolibro decidis eksperimenti la perkorespondan decidigon : per elektronika poŝto aŭ, manke de tio, per helika poŝto.

### Kiuj povos partopreni ?

La membroj elektitaj al la Administra Konsilantaro (nun 31 homoj)

Tamen, la voĉdonado en Ĝenerala Asembleo estas nur « indika », ĉar necesas konsento pri la mandato far la koncernato, krom pri tiuj, kiuj kandidatiĝis.

Alimaniere dirite, al ĉiuj, kiuj ne estis kandidatoj aŭ kiuj ankoraŭ ne uzis sian mandaton (kio valorus kiel konsento), estas nun petate, ke ili formale konsentu aŭ malkonsentu pri sia mandato. Vidu la postan tabelon. (en dua paĝo).

### Kiu voĉdona rimedo ?

La plej taŭga rimedo estas la uzo de elektronika poŝto.

La temoj de voĉdonado estos dissenditaj al tiuj, kiuj posedas elektronikan adreson per la dissenda kaj diskuta listo [ca rcm@recim.org](mailto:rcm@recim.org)

Tamen NAŬ administrantoj ne havas tiun rimedon. Do ili devos respondi al la voĉdonpetoj per poŝto.

### Kiukondiĉe validos la voĉdonoj ?

La regulo pri valideco de la voĉdonoj en la Administra Konsilantaro estas la absoluta plimulto de la ĉeestantaj membroj. Tiu regulo estos aplikita al la tuto de la membroj de la Administra Konsilantaro, kiuj antaŭe estos konsentintaj pri sia mandato.

Nuna situacio : **DEK SEP** elektitoj jam konsentis pri sia mandato. Rilate al tio la absoluta plimulto nun estas NAŬ.

La demandoj kaj la voĉdonoj povos esti observataj en Interreto je la paĝo :

[www.recim.org/admin/bal.htm](http://www.recim.org/admin/bal.htm)

Vi bonvolu enskribi tiun ligilon inter viajn « preferatajn » ĉar tiu paĝo estos atingebla nek el la enhavo nek el la mapo de la ttt-ejo.

### Kiu tempo ?

La eksperimento determinos tion. Por la unua eksperimento (tiu ĉi enketo), la deziro estas ricevi la respondojn de la 14 koncernataj homoj antaŭ la fino de unu monato ekde la eldondato, t.e. antaŭ la 18a de novembro 2008.

Tamen ne atendante la rezultaton de tiu enketo la unuaj konsultadoj povos esti lanĉitaj.

### Kiuj estos la temoj de perkoresponda konsultado. ?

Temos ĝenerale pri relative gravaj kaj relative aŭ necesaj urĝaj decidoj por la bona funkciado aŭ la progreso de ĉiuj niaj tutmondistaj institucioj.

Oni komprenu, ke « gravaj » estas la decidoj pri la strukturoj kaj la organizado de niaj servoj, same kiel pri la nekutimaj elspezoj.

Antaŭdankon pro via kunlaborado

Daniel Durand

Prezidanto.

NOMO	Mandato	Prikonsento	Kiel	Komunikado per
Daniel Durand	2008-2012	oui	ĜA	@
Geneviève Charpentier	2006-2010	oui	ĜA	Poŝto
Patrice Lovesse	2008-2012	oui	Kandidatiĝis + ĜA	@
Karl Kpodo	2008-2012	oui	Kandidatiĝis	@
Peter Davidse	2006/2010	oui	ĜA	@
Liliane Metz-Krencker	2006-2010	oui	ĜA	@
Souleymane Drabo	2006-2010	oui	Acceptation par @	@
Fernando Elena Diaz	2006-2010	oui	ĜA	@
Claudine Fischer	2006/2010	oui	ĜA	@
Inge Grzyb	2006-2010			Poŝto
Chris Hamer	2006-2010	oui	@ al Liliane	@
Masaji Ie	2006-2010			Poŝto
Corneille Mapendo Masirika	2006-2010	oui	@	@ ĉiun monaton
Dorothea Sheasby	2006-2010	oui	Bulteno de la Kanada Centro	@
François Tété	2006-2010	oui	Seminario en Bohicon	@
Hermine Togbe Da Silva	2006-2010			Poŝto
Ireneo Wilczinsky	2006-2010			Poŝto
Claude Jousseau,	2008-2012	oui	ĜA	@
David Foncho,	2008-2012	oui	ĜA	@
Urbain Kapoko Sumaili	2008-2012			@ ĉiun monaton
Yen Campos Cuadro	2008-2012			@
Florence Cusson	2008-2012			@
Michaël Ehinger	2008-2012			Nekonata adreso
Ursula Grattapaglia,	2008-2012			@
Dorin Hehn	2008-2012			@
Jean-Claude Loewinski	2008-2012	oui	ĜA	Poŝto
René Marlin	2008-2012	oui	Renovigo de la mandato	Poŝto
Michelet Michel	2008-2012			@
Giancarlo Rinaldo	2008-2012			Poŝto
Ivanka Stoyanova	2008-2012			@
Hirofumi Sueyoshi	2008-2012			Poŝto